


*Ĉu
Esperanto
Fundamente
estas facila ?*



*Kie oni mal'kovr'as, ke
Ia plej fundament'a regul'o
ŝajn'as
mis'kompren'it'a regul'o !*

Oni kontente proklamadas : Esperanto havas nur 16 gramatikajn regulojn ! Sed rapide la lernantoj ricevas komentojn multe pli ampleksajn kaj aŭdas pri Plena Gramatiko, kiu entenas pli ol kvarcent regulojn.

Tio estas tre grava afero. Kial la genia lingvokreaĵo ne jam konvinkis la homaron ? Kial ni trovas malmulte da esperantistoj en la mondo, kial multe el ili restas senfinaj komencantoj kaj malofte esperantoparolantoj,? Certe multajn kialojn oni povas proponi. Ĉu vi ne aŭdis ofte : Finfine, Esperanto estas ne tiel facila, kiel oni pretendas ! Sed ĉu kulpas la fakto, ke oni pretendas ĝin facile lernebla dum ĝi ne estas tiel, aŭ ke oni prezentas, instruas ĝin mallerte, igante ĝin malpli facile lernebla?

Ĉu Esperanto povas esti kaj resti : « eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante¹ »? Ĉu Zamenhof dirante tion troigis ? Eble. Tamen multaj lernis la lingvon kaj rapide majstris ĝin uzante nur kiel lernilon la Unuan Libron.

Eble estus interese studi la lingvon ekde la komenco. Estas kurioze, ke hodiaŭ la plej multaj - mi estas unu el ili - lernis la lingvon sen koni kaj studi la Fundamenton ! Post ties studo, feliĉe mi trovis ankaŭ kopion de la Unua Libro, ĉefe la antaŭparolon, en kiu Zamenhof klarigas, kiel li konstruis facila sian lingvon. Estis duoble, ŝoko :

Unue, Fundamento prezentas nur dek-ses regulojn, sed preskaŭ neniam oni uzis ilin por instrui min aŭ korekti miajn erarojn, kontraŭe oni gramatike klarigis malfacilaĵojn per multaj aliaj reguloj, kiujn mi penis enkapiĝi kaj oportune uzi.

Due, dum la Unua Libro prezentas originalan kaj neeŭropan strukturon, oni prezentis strukture al mi Esperanton, kiel se ĝi estus eŭropa lingvo, tamen multe pli regula. Eble kulpas iom Zamenhof mem, kiam li skribas en la antaŭparolo : « Sed, ĉar simila lingvokonstruo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj alkiutimiĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la Eŭropaj lingvoj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traŝinginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona),- li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo. »

Mi opinias, ke, dum hodiaŭa tutmondiĝo kiam pli kaj pli da homoj lernas aŭ volas lerni la ĉinan lingvon, kiun ŝajne Zamenhof malkovris dum li studis, ni ne plu devas timi (same kiel li) la fremdecon de la Esperanta lingvokonstruo por eŭropanoj, ke **ni devas instrui denove la Fundamenton kaj tiun dismembriĝon**. Ĉar fakte, la ĉina lingvo, same kiel multaj neeŭropaj, prezentas similan dismembriĝon. La lernanto devas tute forgesi la lingvokonstruon de sia propra lingvo por bone kompreni kiel funkcias Esperanto. Tio postulas ian realan malfacilecon por la komencanto, sed nur traŝirante tiun komencan malfacilecon, oni povos poste taksu Esperanton kiel facilan lingvon. Ĉar ĝi funkcias danke al tre malmultaj reguloj sen escepto, sed samtempe ebligas multegajn kreaĵojn. Same kiel la notoj de la temperita gamo, kiuj estas nur dekdu, kaj tamen ebligas nenombreblajn komponaĵojn. Ĝi estas 'bona lingvo' danke al la principo de la ĝeneraliga asimilo², kiun ebligas la disartikigo de la ideoj sub formo de sendependaj kaj senŝanĝaj vortoj, ankaŭ riĉa lingvo danke al la senfinaj ebloj de kombinado.

Nune, ni rimarku, ke la ok unuaj reguloj : « Partoj de la parolado » esence ne estas pure gramatikaj reguloj sed donas vortojn, kiuj entenas sencon kaj gramatikan rolon : « En nia lingvo ekzistas tiu tre oportuna – eĉ genia – sistemo, ke la *finajoj* indikas la sintaksan, la gramatikan rolon de la *plenaj vortoj* ».³

Do, la vere gramatikaj reguloj estas la ok sekvantaj : Ĝeneralaj reguloj⁴ ; La 9a kaj 10a temas pri prononco, fine la 11a estas **la unua vere gramatika regulo** pri vortoj kaj sekve ankaŭ certe **la plej grava kaj la plej miskomprenita** (tion mi montros sube). Jen tiu regulo :

¹ Doktoro Esperanto en la unua libro, *Krestomatia* p. 245.

² Vidu la libron de Claude Piron : *La Bona Lingvo* aŭ la laboron de la fama svisa psikologo Piaget.

³ Ĉu gramatika karaktero ? Kursero de Georges Lagrange.

⁴ Fakte, PAG p.14 citas la regulojn vicigante ilin ekde tiuj ĉi, sed donas la 11an malkomplete kaj iom ŝanĝita.

11a. La kunmetitaj vortoj rezultas de simpla kunigo de la elementoj, kiuj formas ilin, skribitaj kune sed disigitaj per streketoj^[*]. La fundamenta vorto devige sidas fine. La gramatikaj finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj. Ekzemple : vapor'ŝip'o (bateau à vapeur) konsistas el vortoj: vapor – vapeur, ŝip – bateau, o – karakteriza finaĵo por substantivo.

[*] En leteroj aŭ verkoj por personoj, kiuj jam konas la lingvon, oni povas malmeti tiujn streketojn. Ili celas ebligi al ĉiuj facile trovi en la vortaro la precizan sencon de ĉiu el la elementoj de la vorto, kaj sekve ricevi la kompletan signifon sen ia ajn antaŭa studo pri gramatiko.

Por ne miskompreni tiun Fundamentan (kaj fundan) regulon, oni devas memori, kion klarigis Zamenhof en la unua libro (p.12, 13 de franca eldono de 1887) :

« Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj*⁵ vortoj [...] Tiel ekzemple la devenon de la vorto *frat'in'o* , kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj : *frat* (frato), *in* (virino), *o* (kio estas, ekzistas) (kio estas frato-virino = fratino) »

Do, laŭ la 11a regulo, ni povas kompreni : *o* = tio, kio estas (france : *ce qui est...*) + *in* = ino de. (*féminin de...*) + *frat* (*frère*) » = *frat'in'o* (*sœur*) », sed la eŭropano komprenas : « Mi disponas radikon *frat'* (*frère*), por fari el ĝi substantivon, mi metas la finaĵon *o*, do : *frat'o*, kaj por formi la inon, mi intermetas la sufikson *in*, do : *frat'in'o* (*une sœur*). Tiu kompreno estas kontraŭ la regulo, ĉar *frat* iĝus la fundamenta vorto anstataŭ *o*.

Fakte Zamenhof aldonas : « li (la lernanto) eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas finaĵo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto. »

Certe, kiel klarigis Zamenhof, Esperanto povas konformiĝi al nia propra lingvo kaj sekve ŝajne esti facila en ĝia aspekto, sed se ni ne komprenas, kiel ĝi funkcias , se ni konformigas ĝian funkciadon al tiu de nia lingvo, post komenco ŝajne facila, la afero multe komplikiĝos, kaj ni neniam atingos bonan lingvokapablon sen multe labori, same longe kiel ni laboris por regi nian propran lingvon.

Vere, nia kara lingvo estas simpla, pro siaj konstruo kaj funkciado : Natureco, internacieco, simpleco, reguleco, kohero, klareco, neceso kaj sufiĉo. Ĝi restos simpla, se ni studas, uzas, respektas ĝian fundamenton, kaj se ni ne devigas ĉiujn uzantojn obei multajn regulojn ellaboritajn per komparo al niaj eŭropaj lingvoj.

Nu, oni povas konstati, ke la 11an regulon multaj forgesas, perfidas aŭ ne aplikas, kiam ili instruas aŭ parolas pri vortoj kaj vortfaradoj :

- Ŝajnas, ke preskaŭ neniuj uzas nian lingvon skrib'ant'e tia'manier'e ni'a'n lingv'o'n por ke fremd'ul'o'j pov'u tuj kompren'i dank'e al Universal'a Vort'ar'et'o, kiam li vojaĝ'as inter'naci'e.
- Kiam ni instruas, ni forgesas malkovrigi la streketojn al komencantoj.
- Ofte oni klarigas tute kontraŭ Fundamente, ke la 'plena' vorto : *vapor'ŝipo* konsistas el du vortoj : *vaporo* kaj *ŝipo*, kontraŭe, la Fundamento montras en ĝi trivortojn : *vapor'*, *ŝip'* kaj *o* : 1 : kio estas, 2 : ŝip', 3 : karakterizita de vapor'.
- La tria frazo de la regulo estas forgesita aŭ ne zorgita. Pruve, en la PAG oni legas : « Sed cetere, laŭ la eldiro de Zamenhof, ili (la finaĵoj) povas esti rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj. » (substrekite de mi mem). Oni skribas ekzemple : *patro*, kiel unu vorto (plena vorto), sed la Fundamento skribas *patr'o*, kaj laŭ la regulo ĝi estas ankaŭ kunmetita vorto : *patr' o* = tio, kio estas... *patr'* .

⁵ La nuraj esceptoj estas la radikoj plimallongigitaj de la vortetoj : ~ĉj' kaj ~nj'

Ankoraŭ la aliaj derivataj vortoj kunmetitaj per *patr'* :

- *patr 'a* = rilata al, kvalita de *patr'* ;
- *patr 'i* = manifestiĝi *patr'* = esti patro aŭ agi patre
- *patr 'e* = estante, agante kiel aŭ estiel *patr'*, laŭ maniero de *patr'*.

➤ Oni aŭdas : « *o* estas nur gramatikaĵo, kiu pleonasme⁶ kunportas la substantivan sencon, jam entenata en la radiko *Patr'* ». Sed tio estas kontraŭ Fundamenta. Laŭ la 11a Fundamenta regulo la fundamenta vorto estas la lasta : *o*, do ja la kompletiga vorto (radiko) *patr'* re-alportas la substantivan aspekton. Fundamente : *o*, entenas substantivan sencon : kio estas, kaj plie indikas nominativan kazon en frazo. En vortaro oni trovas : *patr'* (fr. : *père*), en frazo oni trovas : *patr'o* (fr. : un *père*). (Ĉar en la franca lingvo oni uzas nedefinitan artikolon).

➤ Oni legas en la tre interesa libro *Nia Fundamento sub lupeo*⁷ : « gramatikaj finaĵoj estas konsiderataj kiel sendependaj vortoj [...] Tio signifas, ke la finaĵo estus la ĉefelemento, kiu estas specifikita [tiele] de la antaŭa ero. Tio estas ne ĝusta, ĉar *promenis* ne signifas, ke la pasinta momento indikita de *-is*, estus difinita de la ago *promen'* ».

Ne kredeble ĉi tie oni neas la Fundamenton mem, precize ties 11an regulon !

Ni analizu la pretendan elmontron de la neĝusteco de la Fundamenta aserto. Ĉu la verkanto ne vidas, ke *is* ne estas substantivo, ĝi ne estas pasinta momento sed indikas , ke okazis evento en la pasinta momento. Ĝi estas ne nur gramatikaĵo, kiu indikas pasintan momenton aŭ tempon, ĝi havas ankaŭ sencon, *is* signifas *manifestiĝis*. *Kio manifestiĝis* ? La ero *promen* fakte precizigas la manifestiĝon : per ago *promen'*, do ja *promenis* signifas *manifestiĝis per ago promen'*, la 11a regulo bone efikas !

Iom poste la verkisto precizigas, ke finaĵoj estas ne ĉefelementoj sed akcesoraĵoj, kiuj determinas la antaŭan elementon. Tio denove estas la neo de la 11a regulo, kaj li aldonas, ke tio validas por la « veraj sufiksoj » kiel *ar*. Do, en *arbaro*, li vidas ĉefe *arb'*, kiu ricevas veran sufikson *ar*, sekve temas ne plu pri *arbo* sed pri *arboj metitaj en grupo*, sed japano aŭ ĉino vidas, konforme al sia lingvo kaj konforme al la Fundamento, unue, ke temas pri *aro* = *kio estas ar'* de *arb'*, do : *aro* el *arboj*⁸. Kiu vido estas pli facila (regula , logika) kaj pli konforma al la Fundamento? La dua kompreneble, ĉar ĉiamaniere la regulo parolas ne pri ĉefelemento sed pri fundamenta vorto (elemento). Ĉefa vorto – laŭ eŭropa koncepto - estas la radiko, kiu estas la pli grava pri la senco de la plena vorto : *arb*, sed fundamenta vorto - laŭ la regulo - estas la baza vorto : *o*, sur kiu oni konstruas la plenan vorton : *aro*, kaj la kunmetitan vorton : *arbaro*.

Fakte Zamenhof pri tiu vorto donis : *mot fondamental* en la franca, *principal word* en la angla, *Grundwort* en la germana kaj *слово (главное)* en la rusa, *wyrazów (główny)* en la pola, do estas kompreneble, ke tiuj vortoj respondas pli bone al *fundamenta* ol al *ĉefa* en Esperanto. Temas pri vorto, sur kiu oni konstruas la kunmetitan vorton.

Mi prezentis Esperanton al lingvisto, kiu instruas la ĉinan lingvon, post momento ŝi konsentis, ke fakte Esperanto konstruas kunmetitajn vortojn proksimume same kiel la ĉina, sed ŝi diris : « Tamen en kunmetita vorto vi aldonas ekzemple la finaĵon *o*, por determini la substantivon ! » Subite, mi memoris kaj precizigis al ŝi, ke por Zamenhof la finaĵoj estas memstaraj vortoj. Tuje ŝi konkludis : « Se finaĵoj estas taksitaj kiel vortoj, tiam via lingvo funkcias fakte same kiel la nia laŭ la principo :

« **La determinanta (vorto) antaŭas la determinatan (vorton)** ».

Ĉiuj konas la internan ideon de Esperanto, ni diskonigu ĝian internan strukturon.

⁶ Sjo. Cherpillod anstataŭ pleonasme proponas redunde

⁷ de G F Makkink el Flandra Esperanto-ligo, Antverpeno, 1990.

⁸ *Esperanto express* de Renée Triolle p. 38.

Kunmetita vorto, kiel ekzemple : *frukt'arb'ar'o*, ŝajne sekvas la europolingvan skemon :

eventuala Prefikso aŭ ĉi tie Radiko + **Radiko** + eventuala Sufikso + Finaĵo .

frukt+arb+ar+o : Temas pri *arbo*, kiu donas *fruktojn*, sed la sufikso montras, ke estas ne nur arbo sed aro de arboj, do = aro de **arboj** kiuj donas **fruktojn**.


Sed tiu skemo ekzemple ne taŭgas por : *ek'for'ig'i*, *et'ul'in'o*, *tro'ig'ant'o*..., fakte :

Laŭ la Fundamento, ĉefe la 11a regulo, la skemo estas tute simple :

eventuala Determinanto de ' eventuala Determinanto de ' Determinanto de ' **Fundamenta vorto** .



frukt'arb'ar'o =



Tio, kio estas **aro** de **arboj** kiuj donas **fruktojn**.

Ju pli da maldekstraj elementoj, des pli la senckampo malgrandiĝas.

Por ne fuŝi la Fundamentan regulon, oni devas kompreni, ke Zamenhof uzis la vorton : *vorto*, hodiaŭ, li povus kiel la lingvistoj uzi la vorton : *monemo*, sen precizigi *leksemo* aŭ *morfemo*, ĉar por li ĉiuj ricevas sencon. Vidu la frazojn de la unua libro cititajn p.2 aŭ la komenton de P. Janton : « Tiu gravega teksto montras ke Zamenhof elpensis sian lingvon kiel kombinon de bazaj neredukteblaj unuaĵoj, en kiujn li enigis nenian gradigon »⁹.

Por majstri tiun fundamentan regulon, nepre necesas, ke oni konu la sencon de la finaĵoj¹⁰:

o = kio estas ... , ĉu abstrakto, ĉu ulo, ĉu aĵo, ĉu ado aŭ eco ... , tio estas determinata de la maldekstra flankelemento.

a = rilata al ... , kvalita de ... same determinata de la maldekstra elemento.

e = rilate al ... , ĉu laŭ loko, ĉu laŭ momento, ĉu laŭ maniero ; cirkonstance determinata...

i = manifestiĝi ... , ĉu esti, ĉu agi (per), funkcii (kiel) ; same determinata ...

as = manifestiĝas ... , tio estas *i* en tempo estanta (la nuna tempo aŭ la ĉiama tempo)¹¹ ...

is = manifestiĝis ... , *i* en la tempo estinta (ne plu nuna tempo) ...

os = manifestiĝos ... , *i* en la tempo estonta (ne ankoraŭ nuna tempo) ...

us = manifestiĝus ... , *i* en kondiĉa modo (en supoza tempo) ...

u = manifestiĝu ... , *i* en vola modo ...

j = pli ol unu ... , pluralo de ...

n = al, celata estas ... (montrilmorfemo por) ĉu objekto, ĉu tempo, loko aŭ mezuro celata ...

Nur la du lastaj havas kelkfoje nur gramatikan rolon, precize en akordataj vortoj¹².

En : « Amikaj n salutojn », *n* kaj *j* alportas la sencon : celata estas (al) pli ol unu saluto, *n* signifas, ke salutoj estas senditaj al kiu(j) oni parolas, kontraŭe *j* kaj n ne alportas semantikan sencon sed nur gramatikan rolon por akordigi *amika* al *salutojn*.

Kiel la regulo precizigas, ke finaĵoj estas *monemoj* (memstaraj vortoj), oni povas, respektante la fundamenton, kombini ilin : *viv'u'o*^z, *tie'a*, « ĉiam as'ant'a »... Nur la sinsekvo *n'j* ne eblas por ne konfuzi kun la karesiga *monemo*.

⁹ *L'espéranto*, El. *Que sais-je ?* en la franca lingvo de Pierre Janton.

¹⁰ Vort-konsisto, -farado, -analizo, -ordo (1996) A. Cherpillod, p.15-17.

¹¹ Difino de Claude Gacond en lia kurso.

¹² Lingvistikaj aspektoj de Esperanto de John Wells, Eldono UEA 1989, p34.

Se oni ne aprobas komplete la 11an regulojn - nome, ke finajĵoj estas rigardataj kiel vortoj - necesas krei multajn komplikaĵojn por bone kompreni kaj ne erari en vortkonstruo. Necesas kelkaj centoj da gramatikaj reguloj, devigas krei kategoriojn kaj subkategoriojn (radikoj, prefiksoj, sufiksoj, ŝajnsufiksoj, prepozicioj ...), analizi pleonasmojn kaj kvazaŭpleonasmojn, substantivigon aŭ adverbigon de elementoj laŭ la ligita radiko, vortefikojn rektajn kaj inversajn, doni neologismojn anstataŭ arĥaismojn, pripretendi kunmetaĵojn - eĉ kelkajn de la Fundamento - eraraj, ne regulaj, krei esceptojn kaj tiel plu.

Kion precizigis Zamenhof pri tiu regulo ? Ni legu en la 27a ekzerco de la Fundamento :

« Vortoj kunmetitaj estas kreitaj per simpla kunligado de vortoj ; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed - se la bonsoneco aŭ la klareco postulas - oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj : *skribtablo* aŭ *skribotablo* (= tablo, sur kiu oni skribas) ; *internacia* (= kiu estas inter diversaj nacioj) ; *tutmonda* (= de la tuta mondo) ; *unutaga* (= kiu daŭras unu tagon) ; *unuataga* (= kiu estas en la unua tago) ; *vaporŝipo* (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) ; *matenmanĝi*, *tagmanĝi*, *vespermanĝi* ; *abonpago* (= pago por la abono) ».

Zamenhof donas tie multajn trielementajn ekzemplojn (*tut'mond'a*) eĉ kvarelementajn vortojn (*bon'son'ec'o* ; *unu'a'tag'a*), li klarigas la sencon de kelkaj per sintaksa asocio de vortoj uzitaj substantivigite aŭ ne : tablo *por skribi*, anstataŭ *por skrib(ad)o*, same kiel li diris pago *por abono*, li povus diri ankaŭ *por aboni*. La analizo estas libera pri la formo, ekzemple oni povas ankaŭ analizi *skribotablo* kiel *tablo por skriba ago*. La analizo estas ne libera pri la senco, kiu estas eĉ pli preciza ol la simpla aldono de la eroj, ĉar necesas aldoni vortetojn, ekzemple prepozicion por klarigi. La lasta elemento estas ĉiam la fundamenta, eĉ se ĝi estas finaĵo, kaj la maldekstra elemento precizigas ĝin, kaj estas precizigita de sia(j) maldekstra(j) ... : *unu'tag'a* = a de aŭ rilata al *tag* kiu estas *unu* = rilata al unu tago. Antaŭe li donis : *for'pel'is* (ekzerco §9), *sen'ĉes'e* (§13), *mal'ĝentil'ul'in'o* (§21).

Esperanto funkcias laŭ tiu principo : **La determinanto antaŭas la determinaton**¹³. En frazo okazas escepto, kiam la determinanto konsistas el aro da vortoj kaj kiam ĝi estas komplementa propozicio kiu, kiel en 80% el la lingvoj, staras en postpozicio¹⁴. En plenvorto la determinato estas la fundamenta *monemo*, la tri supraĵajn vortojn oni povas klarigi tiele :

For'pel'is : *manifestiĝis pelado for* : *Pel* determinas kio *manifestiĝis*,
for determinas kiel *pelis* = *fore pelis*.
Sen'ĉes'e : Rilate al *ĉesi*, *sen* determinas ke ne *ĉesas* = *laŭ maniero sen ĉeso*.
Mal'ĝentil'ul'in'o : *ino* de hom karakterizita per *mal'ĝentil* eco = *mal'ĝentila homino*.

Oni povas kompreni la 11an regulojn tiele : La determinanto antaŭas la determinaton, ĉiam en kunmetado la maldekstraj *monemoj* precizigas la sekvantajn *monemojn*, alidirite se oni legas frazon kaj ties vortojn de maldekstre-dekstre, oni komprenas, t. e. kunligitan vorton **oni analizas, de dekstre-maldekstre**. La fundamenta *monemo* estas la lasta.

La sama afero okazas dum ni kalkulas per dekumaj nombroj. Oni uzas la indiajn ciferojn alportitajn de la araboj, kiuj skribas dekstre maldekstre. Post la kalkulo ĝis 9, ni ne plu havas novan ciferon, do oni reprenas 0 por la unuoj sed oni maldekstre metas 1 apud la 0, tio donas : 10. Oni analizas : 0 unuo kaj 1 deko. Nombro aldonas novajn necesajn ciferojn maldekstre. Por legi : 5162347, semantike **oni analizas de dekstre maldekstre** : estas 7 kaj 4 dekoj kaj 3 centoj kaj du mil... kaj fine oni sintakse legas kvin miliono cent sesdek du mil tricent kvardek sep. Necesas analizi antaŭe de dekstre maldekstre por scii, ĉu la 5 respondas al miliono aŭ cento de mil. Por helpi la analizon francoj metas punkton (angloj komon) inter ĉiu triciferaj aroj ekde la lasta : 5.162.347.

Simile oni analizas la kunmetitajn vortojn, en kiuj utilas - ne la punktoj sed - la streketoj.

¹³ *Esperanto express*, Renée Triolle p. 41 ĝis 43 aŭ *Parlons Espéranto*, J. Joguín p.106 ; 148.

¹⁴ John Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* p.53.

Ja la akademio oficialigis la gramatikajn kategoriojn de la « radikoj », kiujn jam aprobis Zamenhof tra la studo de R. de Saussure. La 11a regulo parolas ne pri radiko sed nur pri vorto, nu, parton el tiuj vortoj oni ne nomas radikoj, kelkaj el ĝi ricevas ne nur propran sencon sed ankaŭ gramatikan rolon [la genia strukturo de nia lingvo ebligas, ke granda parto de la gramatiko, t.e. la ok unuaj reguloj : partoj de la parolado, estu entenata en la vortaro mem]. Tiu parto formas novan kategorion de vortoj, la memstaraj vortoj, kiujn mi proponas nomi la χ 'vortoj. Do laŭ la Fundamento kaj ties universala vortaro, estus logike konsideri, ke ekzistas ne tri sed kvar kategorioj, ne nur pro gramatika kialo sed ĉefe pro sencenteno (semantiko) :

1. La o'vortoj, kiuj entenas o-(substantivan) sencon, kiel :
aĵ, ul, patr', libr', ide...

[Oni diras ankoraŭ kelkafoje : o'em'vortoj, ĉar plejofte ili estas uzataj kun o-finaĵo, sed ne temas pri sama afero. Atentu, ke ekzemple *ec*, oni povas difini kiel o'em'vorto, ĉar ĝi estas plejofte uzata kun o-finaĵo, tamen ĝi estas a'vorto, ĉar ĝi entenas kvalitsencon, same pri *in*.]

2. La a'vortoj, (kun la e'vortoj), kiuj entenas ĉu kvalitan ĉu rilatan sencon por akompani, precizigi : o'vortojn (respektive : a' aŭ e' aŭ i'vortojn) kiel :
ec, in, grand, at, em, et, oft ...

3. La i'vortoj, kiuj entenas manifestiĝo de ago aŭ stato (ankaŭ ŝanĝo), kiel :
ad, am, ag, est, re, hav, iĝ, ig ...

Kompreneble la elekto de kategorio estas diskutinda, oni scias ke kelkaj vortoj iris de iu al alia gramatika kategorio por ke la vortkonstruo estu pli logika, ke la derivado estu kohera. Tio koncernis ankaŭ la semantikan aspekton de la vorto, ties sencon (Vd. *Flor', gut', rekrut'* ...)

4. La χ 'vortoj, tiuj vortoj estas ĉiuj aliaj : nek o'-, nek a'-, nek i'vortoj. kiel :
o, a, e, j, n, i, u, as, is, os, us, jes, mi, en, unu, ĉie, hodiaŭ...

La finaĵoj : *o ; a ; i, u, as, is, os kaj us*, estas preskaŭ nur uzataj kiel finaĵoj por ajnaj vortoj, ili prezentas respektive la tri unuajn kategoriojn. *e* kategorias kiel *a*.
j ; n estas uzataj nur kiel finaĵo, la aliaj kontraŭe estas plej ofte uzataj solaj sen finaĵo : pronomoj, prepozicioj, korelativoj, nederivataj adverboj ... , ĉiujn oni povas uzi por fari kunmetitajn vortojn.

Plie kelkaj el tiuj *monemoj* troviĝas sur la limo inter du kategorioj¹⁵, ili preskaŭ apartenas ambaŭe : kun *i* la infinitiva vorto preskaŭ funkcias kiel o'vorto en frazo : « ami (la ado) estas agrabla ». En la a'vortaj participoj : *ant*, ekzemple funkcias kiel i'vorto en la frazo : « li estas amanta (= amantas) du virinojn samtempe ».

En la χ 'vortoj iu korelativo ekzemple :

iu, funkcias kelkafoje kiel o'vorto en :

« iu amas » kaj kiel a'vorto en :

« iu lingvo plaĉas al vi ».

Tion oni povas prezenti


sur la sekvanta skemo :

Aliajn ekzemplojn donis

Georgo Lagrange :

pluv povas esti nedisigeble

o'vorto aŭ ankoraŭ i'vorto,
same kiel *neĝ, vent, hajl...*



¹⁵ Mi konkludis tion, sekve de kurso donata de Paul Signoret en la Kastelo Grezijono (Francujo).

Jen unu el skemoj, kiun mi proponas pri la dispartigo en kvar kategoriojn :

LAŬ'SENC'A'J VORT'KATEGORI'O'J KAJ VORT'KONSTRU'O.

| o'vortoj | χ'vortoj | | | | | | | | | | i'vortoj | | | | | | | | | | | |
|----------|----------|--------|-------|--------|-------|----------|--------|---------|--------|-------|----------|------|-----|-----|-----|------|-----|-------|--------|---------|-------|------|
| nul | unu | du | tri | kvar | kvin | ses | sep | ... | dek | cent | mil | | | | | | | | | | | |
| ag | al | ĉe | de | el | for | ĝis | inter | je | kun | laŭ | malgraŭ | nur | per | sen | tra | ... | ag | | | | | |
| amik | | | | | | | | | | | | | | | | | am | | | | | |
| angul | | iu | kio | tia | ĉie | neniel | ies | kiom | tial | ĉiam | neniu | io | ajn | | | | ... | batal | | | | |
| brak | | | | | | | | | | | | | | | | | | bezon | | | | |
| cel | | | antaŭ | baldaŭ | kaj | aŭ | hodiaŭ | pli | ol | ke | nun | tro | | | | | bol | ... | | | | |
| ĉambr | | | | | | | | | | | | | | | | | | ced | | | | |
| danĝer | estr | | | | mi | vi | li | ŝi | ĝi | ni | ili | oni | si | | | | | ... | ĉes | | | |
| ... | foj | | | | | | | | | | | | | | | | | | dorm | | | |
| | | | frat | | se | ĉu | jes | ne | ja | do | | | | est | | | | ... | | | | |
| gramatik | | | | | | | | | | | | | | far | | | | ... | gratul | | | |
| | | | hom | | aĵ | | i | u | a | s | i | s | o | s | u | | | | | hav | | |
| | | infan | | | an | | | | | | | | | | | | | | | ĝen | ir | |
| | | | jar | | ar | ej | | | j | n | | | | ad | | | | | | juĝ | | |
| kandel | | | | | er | id | il | a | e | ek | | | | ĵet | | | | | ... | kant | | |
| ... | | | libr | | ~ĉj | ist | ec | iĝ | ig | | | | | | | | | | | kost | kuŝ | |
| lingv | | | | | ~nj | obl | aĉ | em | eg | re | | | | leg | ... | manĝ | | | | ... | nask | |
| | | | mast | | on | ul | mal | et | ebl | in | um | | | | | | | | | pag | ... | pens |
| | | nom | | | uj | fi | bo | ind | end | dis | | | | | | | | | | | | pov |
| patr | | | | | at | ant | it | int | ot | ont | ut | unt | | | | | | | | | | |
| | | regul | | | | agrabl | | | | | | | | ali | | | | | | respond | ... | |
| senc | | | | | bel | | blank | | brav | | | | | | | | | | | rigard | | |
| ŝu | | ŝip | | | ceter | cert | | dekstr | facil | sid | ... | star | | | | | | | | ... | star | |
| ... | | | | | fidel | | fort | | fremd | | | | | | | | | | | ŝlos | ... | ... |
| tabl | | tag | | | gaj | granda | | grav | ĝentil | ... | trink | | | | | | | | | ... | trink | ... |
| urb | | | | | hel | | intern | | jun | just | uz | ... | | | | | | | | uz | ... | ... |
| vapor | | kapabl | | | | krut | | lac | larg | lert | vid | | | | | | | | | vid | | ... |
| ... | | long | | | | matur | | mol | mult | neces | vol | | | | | | | | | vol | | ... |
| vort | | | | | nov | oft | | ordinar | plaĉ | | | | | | | | | | | pur | | zorg |
| zon | | riĉ | | | rilat | ruĝ | | sam | simil | saĝ | ... | | | | | | | | | saĝ | ... | ... |
| san | | | | | terur | trankvil | | tut | vast | ver | | | | | | | | | | ver | | ... |

a'vortoj kaj e'vortoj


La χ-vortoj povas esti (kaj ofte estas) uzataj solaj, sen kombino, sen finaĵo, kontraŭe la χ-vortoj sub la punktolinio estas preskaŭ neniam uzataj solaj sed kun alia vorto (*monemo*) kiel finaĵoj.

La vortoj, ene de la punktolinio estas morfemoj plej ofte uzataj kiel afiksoj. (prefikso, sufikso), t. e. kun alia vorto kaj kun finaĵo. *At, ant, it, int...* estas uzataj post (kiel participoj de) i-vortoj.

Laŭ la fundamenta regulo N° 11, ĉiuj vortoj, kiuj ne estas χ-vortoj, estas kunmetitaj kaj la lasta -eĉ se ĝi estas finaĵo- fundamentas, ekzemple : Patr'o. io, kio estas patr. Kiel **patr** entenas jam la ideon de **o**, **patr** ade (pleonasme) donas tiun substantivan sencon (kio estas), pro la pleonasmo kaj por faciligi la skribadon, oni ofte formetas la streketon en tia vorto :

Patr'o, oni povas skribi : **Patro**. Same por **kuraĝ'a**, la vorto **kuraĝ** kunportas pleonasme la a-sencon, do oni povas simpligi la skribon : **kuraĝa**, same ankaŭ : **ami**, sen uzi la streketojn.

Kontraŭe, estas utile uzi la streketojn ĉefe kun la komencantoj, por montri la kunigadon : **kuraĝ'e**, **kuraĝ'as**, **am'o**, **bo'patro**, **am'anta**, **am'at'o**, **amik'ec'a** **reto**, **mir'inda**, **prav'ig'a**, **bon'ig'ilo**, **hav'ebla**, **mal'hav'ebla**, **ne'mal'hav'ebla**, **sen'kuraĝ'ulo**, tio estas ulo ĉe kiu kuraĝa kvalito mankas [= sen'kuraĝo'ulo], **al'supr'i**, **tri'mast'o**, tio estas io difinita per mast', kaj la mastoj estas precizigita per tri, do kompreneble ŝipo havanta tri mastojn [= (tri mastoj)o], **tri'mast'o'j**, ŝipoj havantaj...



2. **Ĉu mi est'as vir'o ? Jes mi est'as vir'o. Ĉu vi est'as vir'o ? Ne ! Vi ne est'as vir'o, Vi est'as vir'in'o. Ĉu X est'as vir'in'o ? Demand'u, vi demand'u : Ĉu Y ... Kiu demandas al mi ? Ŝi demandas al li, kiu li estas ? Demandu al Y : Ĉu ŝi estas... ? ...**

3. Mi'a **nom'o** est'as X. Kiu est'as vi'a nom'o ? Ĉu vi'a nom'o est'as Z ? Kiu est'as ŝi'a nom'o ? Ĉu li'a nom'o est'as Z ? Demand'u ... Ĉu mi est'as **ĝoj'a** ? Jes mi est'as **ĝoj'a**. Mi **ĝoj'as**. Mi ne est'as **ĝoj'a**, ĉu ? Mi **mal'ĝoj'as**. Kiu **ĝoj'as** ? Ĉu ili **ĝoj'as** ? Mi est'as **grand'a**. Ŝi est'as mal'grand'a. Mi est'as mal'ĝoj'a. Ĉu ŝi est'as mal'ĝoj'a ? Mi est'as patr'o, kiu est'as patr'o ? Ĉu vi estas patr'in'o ? Mi'a **patr'o** est'as P, kiu est'as vi'a patr'o ? Ŝi'a patr'o est'as R. Patr'o'j est'as vir'o'j. Patr'in'o'j est'as vir'in'o'j. Est'as vir'o'j, ĉu ili est'as **ĝoj'a'j** ? Vi demand'as, ĉu mi as X'n ? Mi jes'as. Ĉu mi est'as vir'in'o, mi ne'as ! Mi est'as vir'a. Ĉu mi est'as vir'in'a ? Ĉu mi vir'in'as ? Demand'u **ĝoj'e**, kiu li est'as ? Demand'u mal'ĝoj'e, kiu ŝi est'as ? Vir'in'e, demand'u ! (Ĉu'e demand'u ! Kiu'e demand'u !) Demandu, kiu estas ŝia patrino ? ...

4. Demand'u li'n, kiu li est'as ? Nom'u li'n. Mi **salut'as** vi'n, salut'o'n al vi. Salut'u ili'n. Kiu salut'as ? X salut'as Y'n. Kiu'n salut'as X ? Li demand'as ŝi'n : Ĉu vi **am'as** mi'n ? Kiu am'as ŝi'n ? Kiu'n am'as ŝi ? Kiu am'as kiu'n ? Ĉu X am'as Y ? Mi am'as mi'a'n patr'o'n, li amas mi'a'n patr'in'o'n. Am'i est'as **ĝoj'e**. Demandu al ŝi, ĉu lia patro amas ŝin ? ... kaj tiel plu...

Kelkaj ekzemploj de kunmetitaj vortoj :

vapor'ŝipo, ŝip'an'aro, pag(i)'povi, grand'kuraĝ'a... (i) por faciligi prononcon

Se oni malkunigas la elementojn por klarigi per frazo, oni inversigas la kutiman legordon :
io, kio estas ŝipo (karakterizita de) vapor' = ŝipo kiu funkcias per vaporo.

Oni analizas same :

aro de ano de ŝipo(j), povi pagi = povi pagadon), rilata aŭ de kuraĝa kvalito kiu estas granda. Ni rimarku, ke ĉiuj vortoj (*monemoj*) samkategorias.

Kio okazas kiam la elementoj malsamkategorias ?

Kiam la vortoj (*monemoj*) apartenas al malsamaj kategorioj (radikoj aŭ ne), ili estas kompletigaj vortoj, do se oni malkunigas la *monemojn* por fari klarigan frazon, tiam ili ricevas la ordon same kiel ili sin kompletigas en frazo : a-vorto antaŭ o-vorto, same kiel adjektivo anstataŭ la substantivo, kiun ĝi precizigas : *grand'anim'a* : rilata al granda animo, *tri'angul'o* = kio konsistas el tri anguloj, *ĉia'manier'e* = laŭ ĉiaj manieroj, *unu'foj'e, unu'a'foj'e, larĝ(a)ŝultr'a, fremd'lingv'ano, tri'kandel'ing'o...*

adverbo antaŭ verbo aŭ adjektivo : *multe'kost'a* = kvalita de multe kosti, *alt'grand'ulo, tie'a...*

prepozicio, esence determinanto lau ĝia signifo, situo antaŭ la alia vorto, kiun ĝi determinas : *ĉirkaŭ'brak'o* = kio estas ĉirkaŭ brako, *sen'kuraĝ'ulo, sur'tabl'e, pri'pens'i ...*

kiel la aliaj χ -vortoj : *pli'mult'iĝi* = iĝi pli multaj, *ne'i,al'supr'i, jes'i, tro'ig'ulo, ne'hav'eblo.....*

Sufiĉas konscii, ke la determinanto antaŭas la determinato por klarigi la vortojn : *ek'for'ig'i, et'ul'in'o, tro'ig'ant'o...*, ĉi tie nocio pri radikoj, prefiksoj aŭ sufiksoj tute ne taŭgas.

En frazo ĉiujn vortojn (*monemoj*) el la kvar kategorioj oni povas kunigi por fari jen : nominativan substantivon, akuzativan substantivon, adjektivon, infinitivan aŭ finitivajn verbojn, adverbojn danke al la vortoj nomitaj finaĵoj, ankaŭ pli ellaboritaj vortojn danke al pluraj *monemoj* (leksemoj aŭ morfemoj)... Nur memstarpovajn vortojn (la χ -vortojn, vidu sube) oni povas uzi solaj (sen finaĵo). La o finaĵo danke al la 16a regulo povas iĝi apostrofo. Do : *dank' al* estas evitinda, ni uzu : *danke al*, povus esti pli bone : *graŭ* (mal'malgraŭ), ĉu ?

La nura limo de la vortkreado estas, ke la kunmetita vorto havu klaran sencon.

Derivado estas ne alio ol speciala kunmetado, en kiu oni elektas radikon de unu el la kvar kategorioj por formi serion de kunmetitaj vortoj, kiuj entenas ĉiam tiun elektitan radikon : frato, frata, frate, fratino, gefratoj, senfratulo, malfratiĝi, ... ; jes, jesi, jesado, maljesa, jesemulo, kapjesi, ...

Do fine la vortfarado estas klara kun nur la 11a regulo, ne devige bezonas la komplikajoj : substantivigo de tia vorto, adverbigo de alia kun vortefiko ĉu rekta ĉu inversa, distingo de radikoj, sufiksoj aŭ prefiksoj, kaj plie de prefiksoidoj, sufiksoidoj, pseŭdopleonasmaj, pseŭdoafiksaj, neregulaj vortkunmetoj, pretendaj eraroj, esceptoj, kaj tiel plu..., kiuj necesigas 133 regulojn en iu gramatika libro aŭ pli ol 40 paĝoj en alia.¹⁶

La Ŝadokoj famigis la frazon : « Kial simpligi, kiam oni povas kompliki ! » Ni ne imitu ilin.

G. Lagrange montris en sia instrukurso, ke la persemantikaj kategorioj analizoj kelkafoje pli efikas ol la pergramatikaj kategorioj por ne erari en vortkonstruo (Vidu ¹ p.1). Sed necesas tamen memori multe pli ol kvar kategoriojn (proksimume tiom, kiom da 'veraj' sufiksoj). La gramatikaj kategorioj utilas por precizigi la propran sencon de la observata (plen)vorto, sed ne bezonas kelkaj centoj de pliaj reguloj por vortfarado aŭ vortanalizo, sufiĉas tiu sekva metodo por bone uzi la 11an fundamentan regulon:

¹⁶ Plena Gramatiko de Kalocsay- Waringhien aŭ Vort-konsisto, -farado, -analizo, -ordo (1996) A. Cherpillod.

1. Ne forgesi la streketojn por konstrui aŭ analizi.

frat'in'o ; *frat'iĝ'o*

2. Komenc(ig)i konstruon aŭ analizon per la fundamenta elemento, tio estas la lasta :

o = kio estas : *in* = ino de : *frat* ; *o* = kio estas : *iĝi* : *frato* = ado por iĝi frato.

3. Oni povas formeti la lastan streketon, nur se tute ne ŝanĝiĝas la senco de la tuta kunmetita vorto¹⁷.

frat'in'o = *frat'ino* = ino de frat ; sed : *frat'iĝ'o* = kio estas iĝi frato ≠ *frat'iĝo* = *iĝo de frato*,

Kutima ekzemplo, kiam la vorto entenas nur du elementojn, kies la flankelemento ade donas la gramatikan senco de la finaĵo. Tion faras la etaj vortaroj : *frat'o* = *frato* ; *iĝ'i* = *iĝi* ; *bel'a* = *bela*...

4. La maldekstren metitaj flankelementoj precizigas pli kaj pli la vorton.

a) Se flankelementoj estas uzataj samkategorie por klarigi perfraze, oni uzas de dekstre maldekstren la monemojn de la plenvorto.

Frato'ino'o = kio estas ino aŭ ineco de frato.

b) Se flankelementoj estas uzataj ne samkategorie por klarigi, la elementoj viciĝas kiel en frazo.

frat'ul'o ≠ *frat'ulo* → *frat'o* aŭ erare *frata ulo*, sed : *frat'ul'o* = kio estas ulo karakterizita de frato = ulo kiu estas kiel frato ; *sen'frat'iĝ'o* = *sen'frato'iĝi'o* = ado de iĝi sen frato.

5. Oni aldonas flankelementon eĉ finaĵon, nur se necesas (nemalhaveblas) por ĝusta kompreno aŭ prononcfacilo.

antaŭ'e'n'iri, *post'e'ulo* (posteulo ≠ postulo), *frat'o'temo*.

Mi ne trovis en nia lingvo misklarigeblajn ekzemplojn de kunmetitaj vortoj laŭ tiu facila analizo.

Eĥe al la rekta analizo, kiu iras de dekstre maldekstren, mi deziras prezenti al vi interesan rimarkon : La nomo de **Zamenhof**, kiel klarigis al mi germano, venas certe de **Samen'hof**, tio signifas la ejo de la semoj, tio jam estas mirinda, ĉar Zamenhof semis multajn vortojn, ankaŭ multajn bonkorajojn, plie, kiel montris al mi amiko [Filip Chavignon] : se oni legas tiun korektitan vorton (fororgesante la h) : **Samenof** de dekstre maldekstren, tio donas : **Fonemas** = **fonem'as**. Nekredeble, ĉu ne ? Zamenhof fakte kreis multajn fonemojn, kaj certe ankaŭ li estis fenomeno !

Ĝenerale mi opinias, ke multaj vortoj, kiujn PAG aŭ aliuloj¹⁸ juĝas malpravaj : *alilando*, *altlernejo*, *misgusto*, *plenluno* aŭ *sinteno*... kontraŭe laŭ Fundamento bone taŭgas. La ŝajna maltaŭgeco rezultas fakte de la miskompreno de la Fundamento, ĉefe temas pri la forgeso de la sementika aspekto de la finaĵoj kaj la erara ideo, ke ili estas nur aldonitaj gramatikaj elementoj. Kulpas la vole-nevole kutima neuzo de la streketoj farita de tiuj, kiuj opinias koni la lingvon, ankaŭ por ni eŭropanoj la fremdeco kaj la nescio de la dismembriĝo de la vortoj (en *monemojn*). Atentu, ni ne juĝu laŭ niaj teorioj anstataŭ juĝi laŭ Fundamento, tiel jam faris Couturat kaj aliaj reformistoj !

Por montri iom ŝerce, ke tiuj facilaj precizoj de la 11a regulo sufiĉas, sen uzi la malfacilaĵojn de la Paganalizo (sen Page analizi !), ni « pripensu pri *pripensu* » :

Unue, se oni prave konstruis la vorton *pripensu*, ĝi ne signifas *pri penso*. Ni analizu :

1) *pri'pens'o*

2) analizo : kio estas pensi, plie pri... (povas sufiĉi, en la franca tio donas la vorton : *réflexion*)

3) *pri'pens'o* ≠ *pri'pensu*, ni ne povas formeti la duan streketon, do ni plu analizos *pri'pens'o-n*.

¹⁷ Same en algebra kalkulo, oni povas formeti parentezon, nur se tio ne ŝanĝas rezulton.

¹⁸ *Parlons Esperanto de J. Jougouin*, p.254.

4) Se ne kontentigas nin la rekta analizo, ni povas fari klarigajn frazojn.

a) Uzante ĉiujn morfemojn laŭ samaj kategorioj : *prio'penso'o* = *prio'penso* = penso pri penso

Tio donas klarigon, eĉ se ne tre simple kaj facile.

b) Uzante laŭ malsamaj kategorioj : *pria'penso'o* = kio estas pria penso
pri'penso'o = kio estas pri penso *(pri'penso'i)o* = kio estas agi pri penso
kaj fine la eble pli konforma klarigo : *prie'pensi'o* = kio estas prie pensi

5) Ni ricevas ĉiam la saman signifon, sufiĉas unu el tiuj analizoj, kaj ne necesas aldoni finaĵon al flankelementoj.

Danke al tiu metodo, oni povis facile analizi aŭ povintus (estus povinta) konstrui tian plenan vorton, kiu ricevas klaran sencon. Tio estas farita elmonstro ! Ĉu ne ?

Aliflanke, la senlima kombinebleco estas tutnature uzata en la 'reala lingvo'¹⁹, ĝi ebligas nin preparoli ion, eĉ se mankas al ni priaj fakaj vortoj. La neeltenebla bezono enigi en la tagan lingvon novajn neologismojn tuŝas tiujn, kiuj ne komprenis la internan funkciadon de nia lingvo, ties Fundamenton. Vortaro kiel PIV bone klarigas nekutiman aŭ fakan vorton danke al frazo konstruita per facilaj vortoj. Same ni povas esprimi koncepton pri kiu ni ne konas la jam fiksitan vorton, danke al kunmetita vorto konstruita per (elinternaj) *monemoj* jam konataj de ni. Anstataŭ uzi ĉiam pli multe da neologismoj, ni uzu pli kaj pli tiun senliman kombineblecon, por ke nia kara lingvo restu facila.

Ankoraŭ ŝajnas al mi, ke pro imitado de niaj eŭropaj lingvoj, oni komplikis vortojn, tiel : *pasinteco* aŭ *estinteco*, tiuj vortoj estas tre adecaj (redundaj) kaj komplikas la memorigon : *iseco*, kelkafoje *iso* sufiĉus por istempo ! Sed ĉar oni instruas misFundamente, ke *is* estas nur finaĵo, kompreneble pro tiu vidpunkto necesas konstrui simile al niaj lingvoj tiujn komplikajn vortojn. Pri tio konstati, ke Grabowski studis la lingvon danke al la unua libro, do uzis plurfoje : *o, as, is ...* kiel memstaraj vortojn. Kiam li skribas la *osa tempo*, ni komprenas pri kio temas, kaj ni konstatas ke li bone komprenis la Fundamenton, precize : La « gramatikaj » finaĵoj estas memstaraj vortoj, do oni povas eĉ kunligi ilin laŭ la 11a regulo. *Pri* la uzo de vorto kiel *am'ant'as*, Z. skribis²⁰ « pli aŭ malpli frue la verbaj finaĵoj eble ricevos la signifon de la verbo *esti* ». Hodiaŭ oni pli precize diras, ke : *as* signifas nune aŭ ĉiame (prezence) manifestiĝi : ĉu esti, ĉu funkcii, ĉu agi, laŭ la vorto (radiko), kiu determinas ĝin. De longatempe oni kreis *rapid'as*(*funkcias*), *grav'as*(*estas*), *martel'as*(*agas per*). Hodiaŭe, pli kaj pli oni uzas formojn kiaj *mi am'at'as*(*estas*), nu ili estas tute kompreneblaj por ĉiuj (eĉ por ne kleruloj), same pri *amantas*, kondiĉe ke oni prezentis kaj instruis al ili la lingvon respektante la Fundamenton, anstataŭ prezenti kaj instrui laŭ la spirito kaj la funkciado de onia propra lingvo.

Konkludo :

Ni memoru la averton de Zamenhof en liaj lingvaj respondoj : « ... plenan detalan gramatikon... ne sole ne faciligus la lernadon de la lingvo, sed terure ĝin malfaciligus ! »²¹ Do, Pag estas mirinde ampleksa priskribo de la gramatika aspekto de nia lingvo laŭ la spirito de eŭropaj lingvoj kaj por tio tre valoras, sed ni ne uzu ĝin por instrui nian lingvon, ĉar ni malfaciligus la aferon !

Esperanto estas esence facila, kondiĉe ke ni Fundamente ĝin prezentas kaj instruas, ĉefe ties 11a regulon kaj internan strukturon (Vidu P. 6).

PIERRE TELLE-BOUVIER, décembre 2008.

Kontakto pjer@ozone.net

¹⁹ La Bona Lingvo de C. Piron, Eld. IEM1997, p. 16 – 20. Vizitu la retpaĝaron : <http://www.bonalingvo.org/>

²⁰ Lingvaj respondoj p. 39.

²¹ citita en La Bona Lingvo de C. Piron, p. 74.


Rimarko pri unu arĥaismo :

Komence, Zamenhof uzis la vorton *cent'jar'o* = io karakterizita de jaro, karakterizita de la nombro cent = *cent jaroj o*, do tiu vorto estas konforma eĉ al analizo farita de PAG pri ekzemple *trimasto* aŭ *triangulo*, kiuj ne iĝis arĥaismoj, ĉu ne? Sed, se oni forgesas ke *o* estas ne nur gramatikaĵo, sed estas ankaŭ vorto - eĉ la fundamenta laŭ la 11a regulo - kiu havas semantikan senco tiam oni analizas *centjaro*, kiel vorton konsistantan el nur du vortoj : *cent'jaro*, fakte tiam ŝajnas pli logike - ĉar ni parolas pri cento da jaroj, ne pri jaro de (kiu estus) cent - uzi : *jar'cento*.

Ĉu tio gravas? Ĉu tio signifas, ke la deklarita arĥaismo *centjaro* estas malbona vorto, ne normala vorto, ne konsilinda vorto? PIV notas : centjaro = jarcento. Ĉu ekzistas eblan nuancon?

Por kompreni, ni prenu paralelajn vortojn, kiuj konsistas el samaj elementoj : *angultrio* : kaj *triangulo*. La suba skemo klarigas, ke triangulo estas speciala angultrio :

Oni memoru ke angulo signifas la planlokon determinatan ene de du duonrektlinioj.



Trianguloj.

Do la planloko estas determinata kaj finita, ĝi estas *o* farita de tri anguloj por la triangulo, sed ne(di)finita por la angultrio, ĉar tiam ĝi estas trio de anguloj, el kiuj ĉiu estas nefinita planloko.

Same kiel *triangulo* estas speciala *angultrio* = trio de anguloj, kiu formas trilateraĵon, tiel same : *jarcento* estas speciala *centjaro* = cento de jaroj, kiujn oni nombras de 1 ĝis 100, kiuj viciĝas, de la unua jaro ĝis la centa, aŭ de ekzemple 1901 ĝis 2000, sed ne ajna cento da jaroj (*centjaro*), kiuj povus viciĝi ekzemple de 1887 ĝis 1987.

Ĉar en *jarcento* fundamentas *cent(o)*, do tio estas cento da jaroj ekde unu ĝis cent, kontraŭe en *centjaro* fundamentas *jar(oj)*, jaro entenas signifo de daŭro, do centjaro = io farita de ajnaj 100 sekvantaj jaroj.

jarcento = io konsistanta el 100 sinsekvaj jaroj kiuj iras de 1 ĝis 100 (cent).

Ekzemple la traduko de la fama citaĵo de V. Hugo : « Ce siècle avait deux ans », per « Tiu jarcento estis dujaraĝa » esprimas bone, ke tiam estis atingita nur la dua jaro de la koncerna jarcento, kontraŭe : « Tiu centjaro estis dujaraĝa » estus ridinda, almenaŭ kurioza traduko signifanta, ke cent jaroj respondas al du jaroj. Kontraŭe, se iu vivis de 1887 ĝis 1987, li vivis (aŭ konis) ja du jarcentojn sed vivis dum nur unu centjaro. (Uzi la vorton jarcento ĉi fine estus konfuzige.)

Rimarkoj :

Cent'jaro estus erara skribaĵo anstataŭ centa jaro (100a) ≠ *centajaro* = iu centa jaro (800a aŭ 1100a).

Jarcentulo = ulo de iu jarcento,

centjarulo = ulo kiu aĝas cent jarojn, sed

centajarulo = ulo de iu jaro cent.

Oni rimarkigis al mi, ke estas problemo, se oni uzas centjaro plurale. Aŭdante : « centjaroj » oni povas kompreni « cent jaroj », fakte okazas dubo, nur se oni ne precizigas kiom da centoj. Tamen mia konkludo : mi ne plu korektos tiujn, kiuj uzas la vorton *centjaro* anstataŭ *jarcento*, krom se ili volas paroli precize pri iu jarcento (ekzemple la 21a).

La legenda kreo de la lingvo Esperanto.

El la Genezo, la unua libro ... de la Torao.

Por ilustru la malatentitan frazon : « la finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj », lasu min rakonti, tute ŝerce , kiel kreiĝis Esperanto. Fakte ne Zamenhof sed ja Adamo kreis ĝin. Jen kiumaniere :

Dio montris al Adamo vicalvice ĉiujn siajn kreaĵojn por ke tiu nomu ilin. Sed Adamo diris ĉiufoje nur ho ! o ! o ! Do Dio klarigis: « jes ja: o signifas tio, kio estas, sed precizigu ĉiun malsimile. Antaŭmetu aliajn sonojn por distingi la vortojn, ekzemple: ter'o, mar'o... » Adamo provis: « o o ... or'o », li diris por la flava metalo. Poste : « F..flo...flor'o ». Bone diris Dio por lin kuraĝigi. Venis papilio sur la fingron de Adamo, kiu montris ĝin fiere kaj rediris “flor'o”, same kiel Bambi kelkajn jarmilojn poste. Ridante kaj babillante Dio korektas al papilio kaj indikas novan sonon *bo* kaj prezentas kreskaĵojn kaj helpas dirante: “her..”. “herb'o” krias Adamo. « Bone », diras Dio, kaj li montras arbon :“a.. arb'o!”diras Adamo. Brave!

Kaj se paroli pri tio, ĉu vi scias kial la vorto *arbo* similas al *barbo*? Jen la klarigo : en tiu momento, Adamo sin turnante al Dio sur lia nubo, kaj vidante, sed kapalpede sur la vizaĝo de Dio, ion kiu similas al *arbo*, li montras tion kaj diras: « *Bo, Ba, Barbo!* » Tial similas la du vortoj.

Adamo nomas tiele ĉiujn objektojn, plantojn kaj bestojn, kiujn Dio prezentas duope, ĝis la fino. “fino ... ino”, tio donas al Dio ideon. Li endormigas Adamon kaj kreas inon. Li ŝin prezentas al Adamo, kiu nur sukcesas diri pro miro:”ha! a! a!” Denove Dio klarigas, ke li devas precizigi: a signifas kiu havas kvaliton aŭ rilata al, ekzemple: kia, bel'a, ina Adamo kreis: mi'a, bon'a, et'a, afabl'a, eĉ dezir'ind'a, li eĉ iom konfuzis la kategoriojn nomante ŝin Eva...

Sed en la Edenĝardeno, Dio malpermesis al Adamo kaj Eva manĝi la frukton de la arbo pri kono de la bono kaj la malbono. Certe vi scias, ke temas pri malarbo (malus en la latina) sed Adamo jam nomis ĝin pomarbo, do Dio, kiu ne volis perdi sian latinon, proponis tamen *mal* al Adamo por formi la malajn vortojn: mal'bon'a, mal'bel'a, mal'permesit'a...

Pruve, post manĝo de la pomo ili eksciis, ke ili estas malvestitaj, nudaj, ĉar ili konsciis pri siaj seksoj, do Adamo proksimiĝis de Eva kiu kriis: hi, i, i... Tiufoje, anstataŭ Dio, estas Adamo kiu klarigas: “ ne diru nur: i = manifestiĝi, sed kompletigu, ekzemple : mi, tim'i, aŭ pli bone: mi tim'as, sed mi volas bonon por vi, ne tim'u! Mi dezir'as nur am'i vi'n!”

Do la kunulino ebligis al Adamo krei la ivortojn: am'i, dezir'i, kis'i, manĝ'i kaj poste la variaĵojn as, u, is... kaj fine la tre gravan n por povi distingi : mi am'as vi'n, ĉu vi mi'n am'as? *, am'u mi'n!

Sed kiam Adamo volis seksumi kun ŝi, sekve Eva kontribuis tiam al la kreado de vorto dirante: he! e! e = rilate al la tro rapida ago de Adamo, precizigante :“mal'rapid'e, pli mal'rapid'e far'u!” ...

Tiele ili do kreis la adverbojn por nuancigi la diraĵojn, kaj finfine estis kreitaj ĉiujn plej fundamentaj vortoj: *o, a, e, i, u, as, is, os, us, j* kaj *n*.

Tiu nepre vera rakonto montras tre bone ke, se la radikoj estas gravaj por distingi la vortojn, la finaĵoj estas la plej gravaj kaj fundamentaj en la vortkonstruo de nia lingvo.

* Sed kiam Eva metis tiun demandon al Adamo, tiu respondis: « Ĉu mi havas elekteblon? »

Kial ni trovas malmulte da esperantistoj en la mondo ?
Krom tiuj, kiuj scipovas multajn lingvojn, kial multaj restas
senfinaj komencantoj kaj malofte esperantoparolantoj?
Ĉu kulpas la fakto, ke oni pretendas ĝin facile lernebla
dum ĝi ne estas tiel,
aŭ ke oni prezentas, instruas ĝin mallerte,
igante ĝin malpli facile lernebla?

Kiel kompreni la 11-an regulon de la Fundamento:

danke al la Unua Libro?

Kial ĝi estas nepre fundamenta?

Kiel uzi ĝin por instrui nian lingvon?

Ĉu Esperanto, danke al tio, indas la titolon facila lingvo,
eĉ « bona lingvo » ?

Ĉi tiu verketo, kies unua eldono (2009) estis rapide elĉerpita, entenas novajn paĝojn :
p.10, 14 kaj 15, kaj kelkajn korektetojn aŭ aldonetojn.

Achévé d'imprimer à Limoges en juillet 2011
Dépôt légal : juillet 2011

ISBN 978-2-9534846-1-8